

# KOMENCANTO

---

*gazeto por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj*



**Nina Vinnikova**  
[NOVOALTAJSK, Ruslando]

---

2000

redakcie — periodo de solidiĝo en E-literaturo — aforismoj  
svedaj tradicioj — noveleto kaj reklamo — filozofie kaj lirike  
daŭrigo de la proverb-ludo — krucvortenigmo  
anekdotoj — aŭstria radio internacia — korespondu!

3

# PERANTOJ de KOMENCANTO

*laŭ ĉi-subaj adresoj vi povas aboni nian gazeton*

## ARGENTINO

Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910 - Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.

## AŬSTRALIO

Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

## BRAZILIO

Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia (DF) - BR - 70084-970

## BRITIO

Esperanto-Asocio de Britio, 201 Felixstowe Road, Ipswich, IP3 9BJ

## ĈEĤIO

Vladislav Hasala, A.Dvoráka 1, CZ-696 62 Strážnice

## DANIO

La Gazetoservo de Danio. Frederik Eriksen, Finsensgade 10, DK-4800, Nykøbing F.

## ESTONIO

Virve Ernits, Mahla 65 — 1, EE — 0012, Tallinn

## FRANCIO

- Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004, Paris.

- R.Melo, 34, Av. de Russie, FR-03700, Bellerive S/A

## GERMANIO

Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse, 9 D-55129 Mainz.

## IRANO

Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, TEHRAN

## ITALIO

Itala Esperanto Federacio, Via Villorresi, 38, 20143, Milano.

## ITALIO, KROATIO, SLOVENIO

Višnja Branković, Via Leghissa 6, IT-34131 Trieste

## KUBO

Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa 11300, HAVANO

## LITOVIO

Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k. 167.

## NORVEGIO

Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18, N-0572 OSLO

## POLLANDO

Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-137, PL-01-865 Warszawa

## SVEDIO

SEF, Lisbet Andréasson, Södra Rörum pl 455, SE — 24294 Hörby

## SVISLANDO

Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH — 4224 Nenzlingen

## USONO

Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito, California 94530, U.S.A.

# redakcie

Karaj legantoj!

Tiun ĉi kajeron vi ricevos, kiam en la Norda duonsfero jam ĉie regos printempo. Sur la kovrilpaĝo kvazaŭ simbolo de amo kaj printempo la cigna paro.

Ni daŭrigas nian ĉefan temon pri ESPERANTO kaj LITERATURO, inter 1894 kaj proksimume 1905 estis tiel nomata periodo de solidiĝo.

Sur la 5-a paĝo jam kutimas aforismoj el la tuta mondo, kiujn ornamas simbolo de tiu-ĉi jaro - drako.

"Svedaj tradicioj" de Ann-Louise Åkerlund prilumas printempajn kaj somerajn svedajn popolajn morojn. Uzante la okazon ni invitas ĉiujn niajn legantojn rakonti pri la tradicioj de via lando, via regiono, via urbo...

Ĉarma rakonto de Martin Ginette el Francio kaj originala REKLAMO je unu litero "r" de Alla Utkina el Ruslando troviĝas sur la oka paĝo.

"Filozofie kaj Lirike" - per beletraj tradukoj el rusaj verkistoj debutas Rafija Jafasova, Ekaterinburg, Ruslando.

Ni daŭrigas temon "Ĉu vi volas esti riĉa aŭ feliĉa?" per tiutemaj proverboj kaj eldiraĵoj. Bonvolu kontribui ne nur per aforismoj - ni atendas versojn, noveletojn, fablojn.

Krucvortengimo de Bill Thorne el Anglio. Anekdotoj. Ni invitas vin pripensi subskribon por la desegnaĵo de Bill Thorne, eble eĉ kelkajn. Ni publikigos ĉiujn provojn.

Korespondadresoj, anoncoj de "Rondo KATO" kaj de Aŭstria Radio Internacia.

AGRABLAN LEGADON!

DANKON !

al **Bill Thorne** el Anglio  
kaj **Burt Titus** el Usono pro la financa  
subteno de KOMENCANTO

## KOMENCANTO

2000 numero 3 / refondita en 1997 / 8 numeroj jare

redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavcev

konstanta kunlaboranto: Rafija Jafasova

adreso:

620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Ruslando

retpoŝto : let@epost.uralpost.ru

abontarifo por 2000:

internacia tarifo: 13 eŭroj aŭ \$14;

orienteŭropa kaj latinamerika tarifo : \$11;

aŭ por ĉiuj — 15 IRK

konto ĉe UEA: vkud-a

ruslanda tarifo kaj la rubla zono: 77 рублей

(за 8 номеров в год) простым почтовым пе-

реводом на имя Кудрявцева Виктора Василье-

вича: 620041, Екатеринбург, а. я. 132

Oni rajtas uzi bildojn kaj verkojn el KOMENCANTO.

Sola kondiĉo - nepre menci KOMENCANTO'n kaj la nomojn de la aŭtoroj kun ties loglokoj.

# Verkistoj de periodo de solidiĝo en E-literaturo

Karaj legantoj, vi jam scias, ke post la historia voĉdonado en 1894 jaro en Esperanta literatur-historio startis la subperiodo de solidiĝo, kiam en E-literaturo aperis multaj novaj nomoj.

Unuflanke ili estis slavaj, precipe rusaj verkantoj — Grabowski, Devjatnin, Wasnewski, Kofman, Leo Belmont. Ili aldonis al la lingvo grandan stilsliberecon kaj flekseblecon.

Aliflanke estis fama franca "esperantista lokomotivo" de Beaufront, kun lia revuo "L'Esperantiste" kaj "Commentaire" (gramatikaj komentarioj), kiu klopodis fari la lingvon kiel eble plej logika, sed samtempe rigida, malmulte fleksebla.

Tiuj du tendencoj: la franca logikemo kaj slava libereco reciproke riĉigis la lingvon kaj rezultigis fine la propran spiriton de esperanto.

Ĉi-sube ni provas kurte konatigi vin kun la menciitaj aŭtoroj.

## Antoni GRABOWSKI

*A. Grabowski* (1857-1921) estis kemia inĝeniero, polo. Li publikigis plurajn sciencajn verkojn de sia profesio, ellaboris polan teknikan vortaron. Li estis granda poligloto, posedis pli-malpli ĉirkaŭ 30 lingvojn.

A. Grabowski esperantiĝis en 1887-a jaro: tuj post la apero de la Unua Libro, kiun li legis kaj entuziasmis pri Esperanto, lernis ĝin kaj post nelonge vizitis

Zamenhof, salutante lin en flua Esperanto. Inter li kaj Zamenhof okazis la unua en la mondo konversacio en la internacia lingvo. Dum kelkaj jaroj A. Grabowski estis reformema, sed post fama voĉdonado en de 1894 li fariĝis fidela fundamentano.

A. Grabowski aktive partoprenis en E-movado: li longe prezidantis la Polan E-Societon, en la Akademio de Esperanto ekde 1908 li gvidis la gramatikan sekcion. Ankaŭ aktiva estis lia literatura agado. La plej ĉefa lia verko estas brila traduko de "Pan Tadeusz" de Adam Miczkiewicz.

A. Grabowski tradukis ĉi-verkon restante en la jaroj de la unua mondmilito en Varsovio sola el sia familio, kaj li estis jam ankaŭ malsana kaj havis por sia konsolo nur tiun traduklaboron.

A. Miczkiewicz

## SINJORO TADEO

(Fragmento el libro IV)

Tade' eksciis: multe da tempo jam pasis,  
Kiam hundoj, en densa arbaro, ekĉasis.  
Mallaŭt', - Ĉasistoj vane streĉas aŭdosenton,  
Vane scieme ĉiuj aŭskultas silenton,  
Kaj en loko longtempe, senmove atendas:  
Nur al ili muzikon praarbaro sendas;  
Hundoj ĝin sondas, kiel mergisto sub maro;  
Kaj pafistoj, turninte tubojn al arbaro,  
Rigardas Vojski-n, kiu per orelo teron  
Demandas. Kiel legas amikoj esperon  
De viv', aŭ mort-verdikton, pri kara persono,  
En kuracist'-vizaĝo, tiel al ĉas-kono  
Lia fide, pafistoj lin rigardis time.

.....  
.....

"Sinjoro Tadeo", kiel skribis K. Kalocsay, "estas unu el la plej grandaj fortostreĉoj de la E-tradukarto, per ĝi

Grabowski fariĝis vere la patro de esperanta poezio". En "Sinjoro Tadeo" A. Grabowski vere evoluigis esperantan poezian lingvon: el la pli ol 200 neologismoj, kiujn li enkondukis, la plejparto eniris la Plenan Vortaron de Esperanto, eldonitan de SAT.

Unu el la plej interesaj lingvaj memoraroj estas traduko de Grabowski "La neĝa blovado" de Puŝkin, ja tiam la lingvo havis nur 900 (!) vortradikojn. Sed malgraŭ tio la traduko tute ĝuste transdonas ne nur la enhavon, sed ankaŭ la stilon, la internan ritmon kaj melodion de la Puŝkina prozaĵo.

Inter tradukverkoj de Grabowski estas dramo de Slowacki "Mazepa" - unu el la ĉefverkoj de pola dramliteraturo, kiun oni prezentis en la Krakova E-kongreso en 1912. Tie oni prezentis ankaŭ la operon "Halka" de Moniuszko, kies tekston tradukis tiel same Grabowski. "El Parnaso de Popoloj" - estas poemkolekto el 6 originalaj verkoj kaj 110 poemtradukoj el 30 diversaj lingvoj. Ĉ-tie rimprova majstreco de Grabowski estas ankaŭ alta, li ofte uzas rimojn spritajn, sed tradukstilo restas la sama klara, simpla, tre proksima al Zamenhova stilo.

Grabowski verkis kelkajn originalajn poemojn, inter kiuj estas "Tagiĝo", kvazaŭ dua himno esperantista, la kortuŝa "Refreno del'filo", verkita por la Krakova E-kongreso, kaj "Sur unu kordo" en kiu li diskutas kun tiuj, kiuj trovas tro striktaj la rimeblajojn de Esperanto.

Seninterrompe laboris Grabowski plu por Esperanto, ĝis sia subita morto: lin mortigis koratako antaŭ la montrofenestro de Esperanta librovendejo. Sed por ni, legantoj, restis multaj belaj paĝoj de lia verkado kaj ni plezure prezentas al vi kelkajn fragmentojn el la famaj verkoj de A. Grabowski.

**Nina Vinnikova**  
[NOVOALTAJSK, Ruslando]



A. Puŝkin

## La neĝa blovado

En la fino de l' jaro 1811a, en la epoko al ni memorinda, vivis en sia vilaĝo Nenaradovo la bona Gavriilo Gavriloviĉ' R.

Li gloriĝis en la tuta ĉirkaŭaĵo pro gastamo kaj koreco; la najbaroj ĉiujminute veturadis al li por manĝi, trinki, ludi kun lia edzino Praskovja' Petrovna po kvin kopekoj je l' bostono; kaj kelkaj el ili por rigardi ilian filineton Marion Gavrilovna'n, gracian paltan kaj deksepjaran fraŭlinon. Ŝi estis rigardata kiel riĉa fianĉino, kaj multaj antaŭdecidis ŝin por si aŭ por siaj filoj.

Mario Gavrilovna estis edukita sur francaj romanoj kaj tial kompreneble jam amanta. La objekto, elektita de ŝi, estis malriĉa oficero, kiu sin trovis forpermeso en sia vilaĝeto.

Ĝi estas kompreneble per si mem, ke la juna homo brulis egale de l' ama fajro, kaj ke la gepatroj de lia amata, sciiginte ilian duflankan amon, malpermesis la filinon eĉ pensi pri li, kaj lin ricevadis pli malbone ol eksigitan asesoron.

.....

## Vasilij DEVJATNIN

Dua larĝe konata figuro de Esperanta literaturo de la menciita periodo de solidiĝo estas *Vasilij Devjatnin*.

*V. Devjatnin* (1862-1937) estis ruso, instruisto de latino kaj de la rusa literaturo. En 1891 li ekkonis Esperanton kaj post unumonata studado jam komencis kunlabori en "La Esperantisto" - tradukis la poemon de Lermontov "Angelo", kiu estis presita en la gazeto.

Dum unu jaro li vigle laboris por Esperanto en Parizo, poste faris kun la turka esperantisto Roman propagandan piediron dum 42 tagoj al la Krakova E-kongreso. Post la kongreso li laboris en München por la entrepreno "Parkurbo Esperanto" - plano de esperanta urbo, kiu celis esti centro de la tuta esperanta movado. Sed tiu plano fine fiaskis, kaj V. Devjatnin veturis al Lejpsig por labori en la Esperanta Instituto. En 1914 survoje al la Pariza E-kongreso, kune kun aliaj vojaĝantoj al la kongreso, Devjatnin estis arestita kaj kiel militkaptito li restis en Germanio ĝis 1918. Eĉ dum la jaroj de la militkaptiteco V. Devjatnin ne ĉesis labori por Esperanto: instruis germanajn suboficirojn al la lingvo kaj ricevis eĉ salajron.

En 1918 - 22 li vivis kaj laboris en Leningrado, gvidis kursojn, estris societojn, verkis. La literatura agado de Devjatnin estis ampleksa. Li estis unu el la ĉefaj poetoj de la kolekto "LIRO" kaj de la Fundamenta Krestomatio, en kiu li kontribuis per versoj originalaj kaj tradukitaj, kaj la originala rakonto "Arturo" kaj per poemtradukoj el la rusa, germana. Ĉe la Universala Kongreso en 1911 li gajnis la unuan premion de literatura konkurso.

V. Devjatnin tradukis la poemon de M. Lermontov "Demono", poemojn de A. Puŝkin "Poltava" kaj "Ruslano kaj Ludmila", dramon de A. Puŝkin "Boris Godunov" kaj multajn aliajn poemojn rusajn kaj alilandajn. Li ankaŭ verkis originalajn komediojn: "Edziĝo", "Nefinita dramo", "La instruita mimikisto" kaj "Unuaj espe-

ranto-satiroj". Li verkis multe da esperantaj lernolibroj.

Kolekto de literaturaj verkoj de V. Devjatnin aperis en 1906-1911 en kvar volumoj de Plena Verkaro. Kiel kutime ni prezentas al via atento malgrandajn fragmentojn de la verkoj de V. Devjatnin.

## Nokto senstela

Nokto senstela!... Vento ribela!  
Kial vi bruas? Kial vi skuas

Kverkon potencan?

Ĝi ja ne timas kaj malestimas  
Venton koleran, bruon inferan -  
Forton sensencan.

Kaŝu sin suno, venu aŭtuno,

Vintro aliru, frosto ekspiru

Ĝin malamike, -

Ĝi grandegulo, brava betulo,  
Laŭte krakante, kvazaŭ mokante,

Staras fortike! . .

A. Puŝkin

## Ruslano kaj Ludmilo

(Fragnemto)

Sur mara bordo izolita

Verdiĝas kverko; ora ĉeno

Sur ĝi, kaj kato instruita

Ĝin ĉirkaŭiras en promeno;

Ĝi iras dekstren - kaj kantadas,

Maldekstren - fablon ĝi parolas.

Koboldo tie ĉi vagadas,

Kaj nimfo en arbar' petolas;

Sur vojoj tie-ĉi sekretaj

Trampas nesciataj bestoj;

Dometo ia sur piedetoj

Kokinaj staras sen fenestroj;

Ĉi tie valoj, kaj arbaro,

Kaj kampoj, kaj bruanta maro

Da mirindaĵoj estas plenaj;

Ĉi tie ĝrd' facila, lerta

El maro brua kaj dezerta

Al bordoj batas sin ebenaj

Kaj jen eliras tridek belaj

Bravuloj el ondegaj helaj

Kun guvernanto mara sia:



Aforismo estas frato de anekdoto, amiko de paradokso kaj filo de saĝeco

{N.Neksin}

# AFO<sup>☹</sup>RISMO<sup>☺</sup>J



Esperantigis

**Martin Ginette**

[SAULXURES/MOSELOTTE,  
Francio]

*Animo estas la nura bizdo,  
kiu subtenas sian kaĝon*  
{Victor Hugo}

*La homoj, kiuj asertas ke  
ili dormas kiel infanoj, ce-  
zte neniam spertis la pose-  
don de ili*  
{Jean Rostand}

*Ŝi estis bela, kiel la edzino  
de aliulo*  
{Paul Morand}

*Kiam mi prelegas, mi vol-  
onte toleras ke iu rigardas  
sian brakhorloĝon, sed mi  
ne toleras ke, post rigardo,  
ĉi-tiu metas ĝin al orelo,  
por scii ĉu ĝi ne haltis*  
{Marcel Achard}

*Ekzistas homoj, kiuj ne  
scipovas perdi tempon  
sola; ili estas plago de la  
okupita homoj*  
{Louis de Bonald}

*Vizino estas verdizema,  
kiam ŝi ne diras ne-utilajn  
mensogojn*  
{Anatole France}

Kolektis kaj tradukis

**Peter Miles**

[membro de LONDONA E-klubo,  
Anglio]

*Pez printempo natuzo  
signalas: FESJU!*  
{Robin Williams}

*Taksi amon ne eblas laŭ-  
preze, sed ĝiajn kromaĵojn  
oni povas aprezeti*  
{Melanie Klark}

*Neniu povas tzi al vi sen-  
ton de malsupereco sen via  
konsento*  
{Eleanor Roosevelt}

*Ridego, kiel la tajdo, estas  
nerezistebla. Anbaŭ estas  
fortoj de natuzo*  
{William Rotsler}

*Mi ĉiam preŝeras kzedi pri  
ĉiuj plej bone por tiel ŝpazi  
tiom da tempo*  
{Rudyard Kipling}

*Kiam ekvideblas fenestro  
de bonŝanco, ne fozmu la  
pezsienon.*  
{Tom Peters}

**Nina Vinnikova**

[NOVOALTAJSK, Ruslando]

**Vladimir Makarenko**

[TVERJ, Ruslando]

*Ofte okazas, ke ni ne vidas  
lon, ĉaz ĝi estas tro granda*

*Multa ĉiosciuloj ne havas  
saĝon*

Esperantigis

**Alla Utkina**

[LESNOJ, Ruslando]


*Senpaga fozomaĝo troviĝas  
nuz en la muskaptila kaĝo*  
{popola proverbo}

*Penso estas floro, vorto -  
ĝezmo, afezo - fozukto*  
{R.Emerson}

*Ajna nenionfazanto estas  
ŝtelisto*  
{J.J.Russo}

*Grazmieno estas ŝildo de  
stultuloj*  
{Monteskeje}

Ann-Louise Åkerlund [HELSINGBORG, Svedio]



# SVEDAĴJ

## Printempo

Sopiro al la luma parto de la jaro estas komuna trajto de la nordaj popoloj. Ĝenerale en Svedio oni konsideras Valpurgan antaŭvesperon la komencon de la printempo. La kutimon ekbruligi festofajrojn dum la vespero la 30-an de aprilo oni konas de jarcentoj. En malnovaj tempoj oni verŝajne uzis fajrojn por forpeli sovaĝajn bestojn, sorĉistinojn kaj supernaturajn estaĵojn, kiam la brutaro por la unua fojo de la jaro estis paŝtataj.

La loko de la festofajro estas kunvenejo por kaj plenkreskuloj kaj gejunuloj en la Valpurga antaŭvespero. Tie oni salutas la printempon per parolado kaj kantado. Neniu sezono ricevas tian bonvenon kiel la printempo. En preskaŭ ĉiu urbeto en la lando oni kunvenas por aŭskulti la ŝatatajn kantojn: "La vintro nun finfuriozis...", "Ho, kiel dolĉe ridetas la maja suno.", "Ĝoja kiel matena birdo mi salutas la printempon..."

Kiam oni aŭskultis la kantojn kaj hurais por la printempo, tiam almenaŭ la loĝantaro de la sudaj kaj mezaj partoj de Svedio draste ŝanĝis sian vivmanieron — sen konsidero de la vetero. Pli malpezaj vestoj, ĝardenmebloj, eksterdomaj kradrostiloj, piedpilkuloj kaj en la laborejoj somera labortempo.

La 1-a de majo estas ekde 1939 la sola neeklezia festotago en Svedio. Antaŭe, kiam okazis akraj bataloj pri sociaj reformoj, amasoj da homoj partoprenis la mani

festaciajn marŝojn. Hodiaŭ la intereso ne estas tiel granda. Ofte oni uzas la liberan tagon por ekskursoj kaj gajaj renkontiĝoj, kiel oni faris en antikvaj tempoj.

La kristana pentekosto estas festata ekde la 3-a jarcento memore al la elverŝo de la Sankta Spirito sur la disĉiploj de Kristo kaj la fondiĝo de la Kristana eklezio. Nuntempe pentekosto estas la plej ŝatata tempo por geedziĝfestoj, kaj niaj preĝejoj je preskaŭ neniu alia momento dum la jaro estas tiel okupitaj. Unu el niaj plej famaj poetoj Esaias Tegnér (1782-1846) nomas tiun-ĉi periodon — ne nur pro abundaj geedziĝfestoj, sed ankaŭ pro la beleco de la freŝe ekfloranta naturo — "la tempo de ekstazo (raviteco)".

**VALPURGA:** virino kiu dum la 8-a jarcento estis abatino en monaĥinejo en Bavario, Germanio. Ŝi estis kanonizata (deklarita sanktulino) la unuan de majo, tial la Valpurga festo.


**LA 1-A DE MAJO** pli-malpli funkciis kiel profana (ne eklezia) festotago en Eŭropo ekde la antikva epoko (la pratempo de Grekio kaj Romo ĉ 400 antaŭ Kristo ĝis ĉ 200 post Kristo). Meze de la oka jarcento oni sur la Eŭropa kontinento aranĝis militajn paradojn kaj solenaĵojn. Dum la Internacia Kongreso por Socialistoj en Parizo 1889 oni decidis ke ĉiuloke oni dediĉu ĉi-tiun tagon al manifestacioj por nova kaj pli justa socio.



# TRADICIOJ


## Inter driadoj kaj elfinoj

En malnovaj tempoj oni kredis ke la mezsomeraj tagnoktoj estas plenaj je aparte forta magio. Laŭ la superstiĉaro ĉio kio kreskas en la naturo tiam ekposedas supernaturajn fortojn. Oni kredis ke eĉ la roso, kiu falas sur grenkampoj kaj herbejoj, estas sorĉita kaj povas doni feliĉon. Je noktomezo oni devis nuda ruli sin en la rozoplana herbaro por fariĝi sana kaj forta dum la jaro.



Ni festas la somermezon memore al Sankta Johano, sed preskaŭ neniu konscias pri tiu kristana mesaĝo. Anstataŭ la festado baziĝas sur la freŝe verda naturo kaj la mallongaj noktoj. Oni foliornamas domojn kaj veturilojn, faras ekskursojn kaj gastas geamikojn.

Oni prefere manĝas eksterdome. Preskaŭ deviga menuo estas peklitaj aŭ marinataj haringoj kun nove




elterigitaj terpomoj kaj glasetoj da brando. Poste oni frandas svedajn ĝardenfragojn.

La somermeza stango staras en la centro de ĉiu mezsomera festado. Kutime oni antaŭtagmeze la antaŭtagon de Sankta Johano vestas la stangon per betulvergoj kaj herbejaj floroj. Posttagmeze oni starigas la stangon kaj, gvidata de muziko ludata per violono kaj/aŭ tirharmoniko, oni dancas kaj ludas ĉirkaŭ la stango.

Kelkaj homoj restas eksterdome la tutan nokton. Se oni tute silente maldormas la plej mallongan nokton de la jaro, oni povos ekvidi multajn estontajn okazintaĵojn. Sed junulino kiu deziras scii kun kiu ŝi edziniĝos, silente pluku sep aŭ naŭ specojn de herbejaj floroj, metu ilin sub sian kusenon kaj sonĝu pri sia estonta edzo.

Se ŝi jam trovis amaton, ŝi povas demandi al la lekanto, plukante ĝiajn petalojn: "Ĉu li amas min aŭ ne amas min? ... amas ... ne amas ..."



**Martin Ginette**

[SAULXURES sur MOSELOTTE, Francio]



# Sciuro ŝatas monon

Unu tagon mi iris en mian ĝardenon por pluki prunojn sur arbo.

Mi havis monerojn en la brust-poŝo de mia bluzo sed ne atentis ke, pro kliniĝo dum rikolto, la moneroj falis sur la herbon.

Vespere mia fratino ekkriis: "kia stranga okazaĵo! Mi trovis etan amason en la kabano de la kunikloj, sub la kaĝo. Miksaĵo de aveloj kaj moneroj!! Neniam mi vidis similan neordinaran provizon!! Kiu faris?"

Subite, mi rememoris ĉion: la plukadon sub la punarbo, la monerojn en mia poŝo, la sciuron, kiu venas de tempo al tempo manĝi prunojn.

La kulpulo estis trovita.

Ĉiuj familiaĵoj ridis - "Ni sciis ke sciuroj ŝatas avelojn; ni ne sciis, ke ili ŝatas monon!!

— Eble ĝi volis aĉeti pliajn avelojn per la mono?" - diris mia fratino.

Sed alia detalo denove pliridigis nin. En Francio, simbolo de unu ŝparkaso estas sciuro. Ĝi multloke aperas sur ŝildoj.

— Kiel ili scias, ke sciuroj ŝatas monon?? Ĉu ili intence faris tiun genian reklamon? Jes, sciuroj ne nur kolektas avelojn, ili ankaŭ kolektas monerojn... kiam ili trovas iom da ili.

Mia sciuro estus bona varbanto por ilia firmao.

PS. Mi reprenis miajn monerojn. Oni lasis la avelojn surloke, sed la sciuro neniam revenis serĉi ilin.

## ORIGINALE

*Interalie, verkoj je unu sama litero povas esti nur originalaj.*

*Ĉar vere, ĉu estas kuraĝulo traduki ion tiamaniere..!*

*En kadroj de nia ludokonkurso pri la verkoj en la internacia lingvo je unu sama litero ni prezentas originalan reklamon de ricinoleo.*

*Alla Utkina jam provis siajn fortojn en tiu ĝenro, kaj jen estas nova provo.*

*Karaj amikoj, estu kuraĝaj — faru viajn noveletojn, versetojn, reklamojn ktp, kies ĉiu vorto komenciĝas je unu sama litero. Ni plezure publikigos vin.*

la red.

**Alla Utkina,** [LESNOJ, Ruslando]

# R E K L A M O

## R I C I N O L E O

**Regula rimedo! Realigita revo! Rava rezulto!**

**Radikala resaniĝo:**

**rakito, raŭkeco, renŝtonetoj, ronko, rubeolo.**

**Rapida regenero, restaŭrado. Raciaj rabatoj.**

**Respektinda reputacio! Rivaloj ripozas!**

**rrr.ruk! ru**



Esperantigis **Rafija Jafasova**, [EKATERINBURG, Ruslando]

# Filozofie kaj Lirike

Andrej Platonov

## En la stela dezerto

(fragmento)

Tagon kaj nokton, kaj la tutan eternon navigas kaj navigas super la tero nuboj. Hejme, sub la tegmento de metiejo, ĉie, kie la ĉielo ne videblas, ni scias, ke ekzistas nuboj.

Se la ĉielo estas vasta, senplena, kaj la suno pro la arda varmego staras, en nia koro navigas nuboj. Ilia susuro kvazaŭ mallaŭta eterna muziko, kiu proksimigas esperon. Kaj ne eblas kompreni, kio plibonas: tiu ĉi melankolia susuro aŭ senkorpa ĝojo, kiam plu mankas kion deziri. La vojo de la nuboj estas silenta, kvazaŭ spiro, kiel neplenumita, nefinverkita kanto, kies vortoj tamen estas konataj.

Nuboj, steloj kaj la suno navigas en unu saman direkton. En tiu ĉi sensenca kaj kurta insisto, en tiu ĉi kuro en la eternon estas sopiro, estas neplenumeco, kaj pro tio ploras animo.

Ekzistas penso: la tero estas ĉiela stelo. En ĝi pli multas admiro kaj libero, ol en la tuta vivo.

La penso mem jam estas ne vivo, sed pli ol vivo. Pro ĝia veno ekbrilas eĉ la plej malproksimaj mondoj.

La penso ne scias angoron kaj ĝojon, ĝi scias nur tion, ke ekzistas necerteco. Ĝi eĉ povas ribeli kontraŭ la vero, se tia vero estas ne bezonata por la homo.



**Nina Vinnikova**, [NOVOALTAJSK, Ruslando]

Leonid Panteleev

el la libro "Duonfermita pordo"

## Sur la maro

Kiom ja estas malsama, diversspeca la mara pejzaĝo! Eĉ observante la maron de unu sama loko, vi ĉiun tagon trovas ion novan, belegan kaj neripeteblan. Kvar aŭ kvin naturaj statoj: akvo, vento, suno, luno kaj sennuba ĉielo — kreas senfinajn versiojn, unu pli bela ol la alia. Eĉ en la densa nebulo la maro ne ĉiam samas. Jen glitis ie la suna radio, kaj la panoramo vigliĝis. Jen reveliĝis la konturoj de la bordo, de akrforma kabo, kiu je ducent saĝenoj tranĉiĝas en la maron. En nebulo tiu bordo aspektas tute fabela. Tie ŝajniĝas turoj kaj kasteloj, tendoj kaj fortigitaj bastionoj.

... Sed en la suna tago tiu ĉi bordo aspektas tute pacema, ripozema.

... Nokte en la nebulo navigas vaporŝipo. En la diafana nokto ĝi navigas kvazaŭ stelaro. Sed en la nebulo - kvazaŭ la Lakta vojo.

... La ondoj povas esti tre diversej. Okazas kaj ŝtormoj, kaj skualoj, kaj plenaj senventoj, kaj ĉiuj ili mezuratas per la meteorologiaj gradoj. Sed antaŭnelonge mi ekvidis sur la maro tute nekutiman bildon. Estis sufiĉe kviete. Brilis la suno. Sed la ondoj iris al la bordo grandiozaj. Iris ili kviete, ne rapidante kaj disbatiĝis same nerapide kaj iel neordinare gracie. Simile disbatiĝas la ondoj en la kinematografio, kiam oni filmas ilin per plirapida filmado. Povas esti mi eraras, sed al mi ŝajnas, mi trovis klarigon por tiu neordinara, baleta "paŝmaniero" de la ondo. Kunpuŝiĝis du ventoj. De la bordo ankaŭ iom ventetis. Kaj kvazaŭ bremsitaj iris la ondoj.

## distra-amuza ludo

sendu al ni aförismojn,  
proverbojn, mikronovelojn,  
satirojn, desegnaĵojn laŭ la temo:

# Ĉu vi volas esti riĉa aŭ feliĉa?

Malprospero similas al mola lito —  
facile enirebla, malfacile elirebla

\$

En loterio gajnas tiu, kiu ne aĉetas  
loteriajn biletojn

\$

Aĉetu hundon. Tio estas la sola  
maniero aĉeti amon kontraŭ morio

\$

Al riĉulo deziru bonan apetiton, al  
malriĉulo - bonan manĝon

\$


Ĉio klariĝas per komparo. Se vi  
volas esti feliĉa - ne komparu

\$

Se vi ne atingis sukceson tuj, provu  
denove kaj denove. Kaj poste  
trankviliĝu kaj fartu por via plezuro

\$

Se dum ĉiu monato poiomete ŝpari,  
jam post unu jaro vi miros, kiom  
kiom malmulte vi ŝparis



Klopodu ricevi kion vi amas, alie vi  
devos ami kion vi ricevos.

\$

Kiam ne estas kion perdi, oni povas  
facile riski per ĉio

\$

Se iu al vi diras: "Mia riĉeco estas  
rezulto de peza laboro", - demandu:  
"De kies laboro?"

\$

"La plej bona maniero helpi  
malriĉulojn - ne iĝi unu el ili

kolektis kaj esperantigis **Timofej Grammatikov** [MISKI, Kemcrovskaja reg., Ruslando]

## Vortkrucenigmo 13x13


**Bill Thorne** [LONDONO, Britio]

### VERTIKALE


2. Ne ni
3. Ekhavos
4. Ne kun
5. Ebleco + forto
6. Mizerulo havas ...
7. Okazanta ekster la kutima
9. Sezonoj inter printempo kaj aŭtuno
12. Dum longa p... odo
13. \_\_\_\_\_ de (lekcio, artikolo, diskuto..)
16. Nepra, deva (sufiks.)
17. Moviĝus en akvo
20. Grandaj ujoj por likvaĵoj
22. Kolor' de E-stelo
24. Loko de restado por ŝipoj, aviadiloj
25. Vojaĝi sen celo
26. Iom moke, kritike
28. Interrilaton de diversaj valutoj
30. Persona, nedifinita pronomo
33. Elemento de skeleto
36. Daŭra
37. Period' de 12 monatoj

### HORIZONTALE

1. Ne staras
5. Timege
8. Granda skatolo
10. In-fano
11. Aer' kiu movas
14. Ne okcident'
15. Stranga okaz'
18. Parte
19. Grandega mus'
21. Freŝa
23. Rezidas
24. Posedi
27. Ĵus sen supersigno
29. Amaso, grupo...
31. Parto de minuto
32. Elemento de trajno
35. Ripozejoj en dezerto
38. Lundepeenda movado de maroj
39. Plado el ovoj
40. Ĝi tenas ŝipon



**Rim.:** Se en la demando staras punktoj en la vorto, tio signifas ke bezonatas enskribi nur la parton de literoj. Se vorto en demando finiĝas je apostrofo('), necesas enskribi respondan vorton sen finaĵo



*plej diversaj el la redakcia teko*

Anonco en gazeto:

"Mi serĉas edzon, kiu drinkas, fumas kaj amindumas.  
La geedzoj devas havi komunajn interesojn"

\*\*\*

Teatro de unu aktoro.

La tuta bileto estas vendita.

\*\*\*

— Vi scias, kiam mi legas ajnan medicinan libron,  
mi komencas trovi ĉe mi ĉiujn malsanojn, priskribitajn  
en la libro.

— Vi scias, mi havas analogiajn sentojn, sed kiam mi  
legas *Kriminalan kodon*.

\*\*\*

Gejunuloj supreniĝis sur la monton, kvietigis la  
spiradon kaj li diras al ŝi:

— Rigardu, mia kara, kia bela valo estas antaŭ ni!

— Por kia diablo ni grimpis ĉi tien, se malsupre estas  
tia belego.

\*\*\*

Juna patrino dormigas sian bebon kaj kantas al li  
lulkanton. Unu horon kantas, la alian,

la trian, sed li ne dormas. Fine, la  
bebo levas la kapeton kaj diras:

— Patrino, vi, certe, bone kantas, sed  
mi dormi volas!

\*\*\*

Pesimisto vidas nur senfinan tunelon  
Optimisto vidas lumon en la fino de  
tunelo

Realisto vidas tunelon, lumon kaj  
trajnon, rapidantan al li

\*\*\*

Edzinoj havas du ĉefajn pretendojn:

1) mankas kion vesti

2) mankas loko en la vestoŝranko

## Margarita Zujeva

[MOSKVO, Ruslando]

Policano Robert Smit haltigis la aŭton de iu sinjorino pro  
la trorapideco kaj tuj ordonis la punon:

— Vi devas skribi 100-foje la frazon: "Mi neniam plu  
malobeos la regulojn de la strata trafiko"

... la sinjorino okazis lia eksa instruistino

\*\*\*

Komercedomo "Rajmonda" riparas en Nanto (Francio)  
domon al unu metallaboristo. Jam post 2 monatoj la farbo  
komencis defali de la muroj. Ĉiuj reklamacioj senutilis.

Tiam la metallaboristo metis sur la domo ŝildon

"FARBADON PLENUMIS ANTAŬNELONGE FIRMAO  
"RAJMONDA".

La sekvan matenon venis riparista brigado.

\*\*\*

— Ĉu via kurso de la AJLO-terapio havas sukceson?

— Jes, 20 pundojn je ĝi mi profitis, sed ĉiujn konatojn  
perdis.

\*\*\*

— Pri kio volas okupiĝi via filo?

— Li volas iĝi reumatologo.

— Pli bonas iĝi la denta kuracisto.

— Kial?

— Pli multe eblas perlabori. Koron la homo havas nur unu,  
sed la dentojn - 32!

\*\*\*

Edzino lasiĝ edzon. Post iu tempo ŝi pensis kaj revenis.

La edzo:

— Por tio, ke vi lasis min, mi vin pardonas, sed por tio, ke  
vi revenis - mi ne povas vin pardoni.

\*\*\*


Telefonu al Margaret

En unu Londona gazeto dum kelkaj tagoj aperis anonco:

"BILL, TELEFONU AL MI, MI ĈION AL VI  
PARDONOS!"

Kaj en unu el la sekvaj numeroj de la gazeto apud tiu  
anonco aperis la alia: "BILL! IRU AL DIABLO!

TELEFONU JA FINE AL MARGARET, KIU VIN JAM  
DELONGE PARDONIS!" *turmentita leganto*



Pripensu  
lanceble  
serĉan  
subskribon  
por tiu ĉi  
desegnaĵo de  
**Bill**  
**Thorne**  
[LONDONO,  
Anglio]

# KORESPONDU!

Ĉiu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj aŭ 2 IRK por eksterlandanoj. Pagintaj abonantoj de "K" - senpage

*Tatjana Vtorova*  
kaj ŝiaj komencantoj  
volas korespondi  
tutmonde pri ĉiuj temoj  
50 let Oktjabrja, 20-283  
VOLGOGRAD  
400082  
RUSLANDO

*s-ino Laura Vieillefond*  
Esperanto Pays Foyen  
infanoj 9-11 jaraj ŝatas  
korespondi kun samaĝuloj  
31, rue Langalerie  
33220  
Sainte Foy la Grande  
FRANCIO

*s-ro Valerij Makarenko*  
korespondi tutmonde pri  
diversaj temoj  
Bobkova, 28/3-6  
TVER  
170024  
RUSLANDO

Timur Halilov  
13 jaroj, ŝatas dancojn, *aj-ki-  
do*, futbalon, deziras kores-  
pondi tutmonde kun  
samaĝuloj  
p.k. 132, RU-620041,  
EKATERINBURG  
RUSLANDO

*Douglas Mattev*  
komencanto, studento  
pri pluraj lingvoj  
Ap. 394-7050  
CARTAGO  
COSTA RICA  
djavmattev@hotmail.com

*Afshin Rasoli*  
26 jara studento dez.kor.  
tutmonde pri ĉiuj temoj.  
Respondo garantiata  
No 14, Homayune Lane,  
SH. Rajayi Street,  
IR-69156 Borujerd,  
IRANO

*s-ro Miroslav Zavodsky*  
76 jaroj, jogo,  
vegetarismo,  
naturkuracado, ĝardenado  
Juraja Zevodskeho 67,  
SK-010 04  
SLOVAKIO

*s-ro Manfred Fuhrer*  
korespondado, ebleco de  
reciprokaj vizitoj  
Begay Datongue,  
PH-2419 SANTA  
BARBARA,  
Pangasinan,  
FILIPINOJ

*s-ro Mato Špekuljak*  
47 ja., tradukisto el la  
rusa lingvo; reciprokaj  
vizitoj, piedpromenado  
Oštarijska 8,  
HR-41000  
ZAGREB  
KROATIO

*f-ino Dušanka Korotaj*  
18 jaroj, tutmonde kun  
gejunuloj  
Kotarovec 48,  
HR-42208  
CESTICA  
KROATIO

*s-ro Edson Lisboa Fiho*  
interes. pri framasonismo  
R.Dr.Hamleto Fellet 85,  
apt. 401, Vale do Ipe,  
BR-36036-130  
JUIZ DE FORA  
Minai Gerais  
BRAZILO

*s-ro Vinicius Mathias*  
22 ja., kunvojaĝi, danci, trin-  
ki, manĝi, lingvoj, psikosmaj  
terapioj  
Rua Alexandre Leonel, 1065-  
Vairro Cascatina, BR-36033-240,  
JUIZ DE FORA-MG  
BRAZILO

## RONDO KATO

Grupo de esperantistoj kiuj  
posedas aŭ ŝatas katojn, kaj  
ordinarajn kaj rasajn. Nun  
kun membroj en 36 landoj.  
Pliaj informoj ĉe la  
*s-ino Ingrid Nasholm,*  
Linderbergsgatan 4, S-853 56, SUNDSVALL, Svedio



## RADIO AŬSTRIA INTERNACIA

Informas amplekse pri politiko kaj aktuala okazado, kulturo kaj scienco,  
ekonomio, kroniko kaj sporto. Kontribuoj el la federacilandoj kaj informoj  
por feriantoj, speciale por geaŭstroj eksterlande. Aŭstria muziko donas  
al la programo de RAI neintermikseblan karakteron  
Nia retadreso: roi.esperanto@orf.at

tempo (UTC)	kontinento	frequenco	ondoj
<b>dimanĉo</b>			
08-05	Eŭropo	13730 kHz	22 m
10-05	Azio	21650 kHz	13 m
10-05	Aŭstralio	21765 kHz	13 m
12-05	Eŭropo	13730 kHz	22 m
12-05	Nordameriko	13730 kHz	22 m
20-05	Afriko	13730 kHz	22 m
23-30	Eŭropo	13730 kHz	22 m
<b>lundo</b>			
00-04	Latinameriko	9870; 13730	31; 22
04-05	Eŭropo	13730 kHz	22 m

UTC - tempo de Grinviĉa meridiano

CET - Centra Eŭropa tempo

|| CET = UTC+2horoj

*s-ro Vladimir Kostin*  
deziras korespondi  
tutmonde pri ĉiuj temoj  
Lenina, 71-12  
TEMRUK  
RU-353520  
Krasnodarskij kraj  
RUSLANDO

*Marcos Aurelio Souza*  
deziras korespondi  
Rua Crispim Mira 97,  
Apt 1102  
Florianopolis - SC  
88020-540  
BRAZILO

## KOMENCANTO-2000

abono de KOMENCANTO-2000 kostas 77 ruslandajn rublojn.  
Internacie: 13 eŭroj al UEA-konto "vkud-a" aŭ ĉe via landa peranto

